# CERBE kaj KORE



KULTURA SUPLEMENTO
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 94

*N-RO 1 (69), JANUARO 2018*

Karaj Samideanoj!

REU lanĉas novan elektronikan revuon. Bezono por tio aperis ĉar nun ne plu ekzistas aliaj placetoj, kie esperantistoj el Rusio povus libere prezenti ĉiujn siajn kreaĵojn kaj en kiu oni povus informi pri lokaj kulturaj eventoj. Kompreneble, ankaŭ alilandaj esperantistoj povas kontribui.

La unua numero de ***Cerbe kaj Kore*** aperis en majo 1990 laŭ iniciato kaj sub redakto de Vladimir Samodaj, la lasta – en majo 2000 kun numero 5(68). Ĝi estis organo de Moskva Literatura Esperanto-klubo, funkciinta kiel fako de la klubo “Lev Tolstoj” (ĝis nun unufoje monate la tradicio de ĉiumonataj literaturaj kunvenoj tie daŭras). Ekzistis tri periodoj de aperado de la revueto: 1a – 1990-1992, entute 22 n-roj (redaktis Vladimir Samodaj); 2a – aprilo 1995-julio 1997, entute 28 n-roj (redaktis V. Samodaj); 3a - decembro 1998-majo 2000, entute 18 n-roj en 16 kajeroj (somera kajero 1999 estis triobla), redaktis Valentin Melnikov. REU decidis renovigi tiun tradician titolon, kaj emisii la kulturan suplementon al sia Bulteno sub tiu ĉi bone memorata por la malnovaj generacioj de rusiaj esperantistoj titolo. Diference de la tri antaŭaj periodoj, kiam CkK estis multobligata surpapere, en sia kvara periodo la revuo aperos nur elektronikforme.

Ni esperas, ke nia revueto servos al esperantistoj por disvolvo de iliaj kreaj kapabloj. Ni sencenzure aperigos ĉies kontribuojn, se ili estos verkitaj je la minimuma akceptebla lingva kaj stila nivelo. Konsideru, tamen, ke tro longajn verkojn ni aperigi ne povos. Prioritaton por aperi havos verkoj de la membroj de la asocio, kvankam ĉiu esperantisto rajtas esperi vidi sian verkon (des pli se ĝi estos bona!) sur niaj paĝoj. Siajn kontribulojn sendu al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru.

CkK estos ricevata aŭtomate de ĉiuj membroj de REU same, kiel Bulteno de REU, sen aldona pago. Eksterrusiaj esperantistoj, kiuj ne emas aliĝi al REU (kvankam tio libere eblas!), povas peti de la Estraro de REU aboni ĝin aparte kontraŭ speciala modesta abonpago (7 eŭroj jare al UEA-konto reua-p – poste nepre informu pri tio laŭ la supra adreso).

# Enhavo


*Originala prozo*
**Alekseo Nistratov. La stelaj hundoj 4**
**Jefim Zajdman. Legendo pri Kniŝ 15**

*Originala poezio*
**Mikaelo Bronŝtejn. Novaj poemoj 6**
**Valentin Melnikov. OK 8**

*Tradukita poezio el Esperanto*
**Mikaelo Giŝpling en tradukoj de Ludmila Novikova 9**

*Tradukita prozo*
**Nikolao Bajkov. La leĝo de Tajgo.**
**Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko 16**

*Instruado*
**Vladimir Opletajev. Tipoj de Esperanto-kursoj 20**

*Nekrologe*
**Jefim Semjonoviĉ Zajdman (1937 - 2017) 11**

*Anonco*
**Internacia konkurso de poezio por junuloj 27**

## *Originala prozo*

# La stelaj hundoj

***ALekseo Nistratov, Moskvo[1]***



La plej hela stelo en la ĉielo nomiĝas Siriuso, ĝi troviĝas en la konstelacio Granda Hundo. Ĉu vi scias kialon? Mi aŭdis tiun ĉi historion en iu hunda azilo.

Evidentiĝas, tiu fora stelo havas planedon de Hundoj, tre similan al nia Tero. Loĝantoj de tiu planedo ankaŭ similas terajn hundojn de ĉiuj specoj - grandaj kaj etaj, fajnaj kaj dikaj, kurtharaj kaj longharaj. Sed ilia ĉefa komuna trajto estas evoluinta intelekto kaj bona koro. Pro tio ili vivas pace kaj riĉe sur tuta planedo. Ĉiu hundo havas propran domon, provizon de ostoj kaj kolbasetoj, molantapiŝon por dormo, vastan korton por gajaj ludoj kaj promenoj kun amikoj. En hundfamilioj gepatroj edukas hundidojn. Solaj kaj forlasitaj hundoj sur la planedo ne ekzistas.

Tiuj hundoj scias kaj scipovas multon kaj jam kapablas konstrui kosmoŝipojn kaj flugi en kosmo (kiel niaj famaj hundoj-kosmoflugantoj Belka kaj Strelka) - verŝajne, pro ili la konstelacio estis nomita La Granda Hundo. Kaj certe, ili serĉis en kosmo "gefratojn laŭ racio", tio estas aliplanedajn hundojn. Antaŭsento konvinkis ilin, ke ili ne solas en la universo. Dum longaj jaroj ili levis siajn percepteblajn orelojn al nokta ĉielo, sed sensukcese.

Niaj hundoj foje hurlas nokte. Ni malaprobas ilin, postulas eksilenti, ne sciante, ke ili tiamaniere vokas siajn gefratojn. Kaj unufoje laŭta kaj daŭra hurlo de teraj hundoj supreniĝis altege, trapasis kosman spacon kaj atingis atentemajn aŭskultantojn de la planedo de Hundoj.

Kio ja komenciĝis! Ili eksciis pri la Tero kaj ĝiaj loĝantoj kaj tre ekvolis konatiĝi kaj amikiĝi kun ili. La hundoj tuj ekis prepari grandan teamon de la plej bravaj kaj saĝaj

---

[1] La aŭtoro, universitata docento pri industria ekologio, volontulas en hunda azilo.

- la "stelaj hundoj". Dezirantoj ekvojaĝi tiom multis, ke oni devis elekti diversajn ekstere, sed plej bonajn karaktere kandidatojn. Ĉiuj kune ekipis grandan kosmoŝipon, kunprenis provizon de manĝo kaj akvo, kunmetis planon de flugo kaj komunikado sur la Tero. Milionoj da okuloj kun espero adiaŭis raketon kun aro de la stelaj hundoj.

Flugo al la Tero estis plena da aventuroj kaj danĝeroj kaj daŭris kelkajn monatojn, sed la amikeca teamo kun ĉefo Vega superis ilin kaj atendegis la alvenon - tiom forte ili volis renkonti la terajn amikojn! Stiristoj intencis alteriĝi en nia lando, kie multaj hundoj loĝas (laŭ statistiko ĉiu kvara el ni). Kiam ĝis alteriĝo restis iomete, okazis terura akcidento... Pro potenca gravito de la planedo la ŝipo iĝis nestirebla kaj falis en oceanon. Ne timu - saĝaj hundoj ĉion antaŭpensis - ili rapide surmetis protektajn kostumojn kaj descendis per paraŝutoj. Neniu el ili pereis, kvankam kelkaj kosmoflugantoj vundiĝis (se vi ekvidos tian hundon - nutru kaj zorgu ĝin, ĝi bezonas helpon). Tamen saltante de granda alto, ili trafis en diversajn kvartalojn kaj eĉ en malsamajn urbojn aparte unu de alia. Foriginte la kostumojn, bravuloj startis esplori novan mondon de hundoj kaj homoj.

La senditoj facile ekkomunikis kun siaj parencoj-hundoj kaj amikiĝis, ĉar bojo kompreneblas sur ajna planedo. Ili mire eksciis, ke sur la Tero hundoj vivas kun homoj, helpas al ili ĉasi, gardi domojn, paŝti brutaron, savi viktimojn de akcidentoj. Antaŭ kelkmiloj da jaroj niaj hundoj ĵuris servi al homoj kaj ekde tiam ne lasas ilin. Ankaŭ plejmulto da homoj amas siajn kvarkrurajn amikojn: nutras, promenigas, zorgas pri ili.

Sed strangaj dugambaj estaĵoj restis por ili tute enigmaj. Ja kio homoj? Neniu vidis, kiel aliplanedaj hundoj alteriĝis kaj kaŝiĝis en nokta mallumo. Kaj matene sur stratoj subite aperis nenies strangaspektaj hundoj, kiuj bojis al homoj aŭ silente proksimiĝis al ili. Ja stelaj hundoj unue vidis nin kaj treege volis interparoli: jen kion signifis ilia bojo! Sed bedaŭrinde ni parolas diverslingve kaj nenion komprenis.

Homoj ektimis invadintojn, kaptis ilin kaj lokis en kaĝojn, ĉirkaŭis ilin per altaj bariloj, por ke la hundoj ne fuĝu. Certe, oni nutris kaptitojn kaj fojfoje eligis por promeni, sed neniu provis ekparoli kun ili. Tiel aperis hundaj aziloj.

Ho, kian ofendon sentis la stelaj hundoj. Ili intencis rakonti al homoj pri sia planedo, pri bonfarta vivmaniero tie, pri atingitaj de ili sukcesoj. Ĝuste tia devas esti vera hunda vivo – gaja kan senzorga.

Niaj herooj ĝis nun restus malliberaj en la aziloj, se volontuloj ne atentus ilin. Ili unuaj komprenis, ke azilaj hundoj distingiĝas de la ordinaraj kaj volas mesaĝi ion gravan. Ĉiam ili renkontas homojn per rida bojo, ŝovas siajn belajn muzelojn kaj svingas per vostoj. Kaj ni pograde lernas, kiel kompreni ilian lingvon kaj respondi al ili. Kelkaj feliĉuloj tiom bonŝancas, ke oni liberigas kaj prenas ilin hejmen.



Tamen multaj stelaj hundoj, la sentimaj kaj noblaj estaĵoj, ankoraŭ turmentiĝas en aziloj. Ilia tasko ankoraŭ ne estas plenumita, kaj ili pacience atendas renkonton kun homoj, por rakonti ĉion al ni.

Do kiam vi rigardos noktan ĉielon kaj ekvidos la helan stelon Sirius, rememoru ĉi tiun historion. Ni ne solas en la senlima kosmo! Sur la Tero senditoj de la planedo de Hundoj longe atendas nin, porfariĝi niaj plej bonaj amikoj.

Por tio vi simple vizitu la plej proksiman hundan azilon.

## *Originala poezio*

# Novaj poemoj

***Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvino)***



*   *   *

Apenaŭ iun en Londono
zorgigos multe mia bono,
dubindas ankaŭ, ke Ĝakarto
demandos min pri la bonfarto.
Supozas mi, ke Amsterdamo
min traktos kun ne tro da amo,
nature, ankaŭ en Kanbero
min ne renkontos ĝoja kvero,
kaj opinios min Novjorko
en sia pugo leza forko.
Verŝajne, ankaŭ en Pekino
mi estos fremda laŭ difino,
kaj scias mi sen ajna miro,
ke ne atendas min Kairo.
Nuntempe, certe, por Kievo
mi estas preskaŭ fremda nevo,
normale l' sankta Vatikano
min ne demandos pri la sano,
kaj en la foro, kun trankvilo
ne konas tute min Brazilo.
Sed ja alio l'cerbon rodas
senhumorigas kaj eksplodas
despere, kiam mi konstatas,
ke ankaŭ Moskvo min ne ŝatas.

***14.07.2017***

*   *   *

Apenaŭ havas ŝancon la esper',
ke l' tuta mondo fine nin komprenos.
Apenaŭ en feroca atmosfer'
al ni adeptoj pacaj are venos.

Apenaŭ vera am' al poezi'
la sekiĝintajn korojn veke tuŝos.
Apenaŭ iam vidos vi kaj mi,
ke la kruelo ne plu ĉion fuŝos.

Kaj ununura restas la motiv'
por vortojn la sincerajn plekti rime:
Amikoj ĉeas nun en nia viv',
kaj ili nin komprenas. Peranime.

***01.09.2017***

*   *   *

Arbaron mian ĵus alvenis frua frosto.
Ne respegulas tion bone kruda proz', do
plenigas pulmojn mi, la froston enspirante,
kaj friskajn rimojn per la lango tuŝas frande.
Naskiĝas versoj en aer' malvarma virte,
elkrias ilin mi kun la sincera mir' de
infano, mire ekvidinta novan neĝon.
Ektintas laŭte miraj rimoj, kiel preĝ' en
la antaŭsento de la ŝanĝoj en natur' kaj
en mia vivo dum kurantaj tagoj kurtaj.

***01.11.2017***

***Al...***

Aminjo mia, animinjo mia,
aspirojn miajn ĉiam akcelante,
tra mia revalbumo milfolia
denove min instigas al elan' de
junulo ĉe l' unua enamiĝo,
knabet' nesperta, adoranta belon –
eĉ tio nur fariĝus jam feliĉo,
sed ja krom tio reaperas cel' en
ĉiutageco, kiun mi rutine
toleras, ŝatas, skoldas kaj ĉeestas.
Jes, mi konfesu, ke entute mi ne
plu emas festi, kiam ĉiuj festas
obtuzan, sensignifan, stultan daton.
Ekrana pur' revigas pri l'renkonto.
Mi vin atendas. La fortuna bon' do
asistos min atingi l'atendaton.

***04.11.2017***

*  *  *

Trodolĉa bero de libero
malstreĉas singardemon.
Pri tiu ĉarma duonvero
kelkiuj spertis mem en
situacioj, dekomence
apreze sendanĝeraj,
evoluintaj ekstermense
ĝis hororigaj sferoj.

Ho jes, mi ŝatas la liberon,
sed mensa diabeto
postulas resti sen sufer' en
fastado aŭ dieto,
se mia ŝtato, tro kaprice
l'frandaĵon disdonanta,
ne aktivigos min surprize
per piedbato vanta.

***12.12.2017***

## OK



## *Valentin Melnikov (Moskvo)*

Anglo pensas, ke "ĉio bonordas".
pensas ni pri cifer' – tri plus kvin,
kaj por mi la animon agordas
tiu simpla literokombin'.
Antaŭdorme min hantas imago,
de profundaj impresoj la gam':
via ĉarma rideto sur lago,
akvo, suno... kaj revo pri am'.
Koron premas soleca vegeto.
Vi mesaĝas, sed plu restas for.
Mi sopiras pri via rideto
kaj varmigas min nur rememor'.
Ĉirkaŭprenu min arde, tutkore,
kisu longe, kun rava tener'!
En la mondo ekzistu porhore
vi kaj mi, kaj ne gravas ceter'!

## *Tradukita poezio el Esperanto*

## *Mikaelo Giŝpling* **(10.01.1924 – 26.09.2017)** *–* *Ludmila Novikova (Moskvo)*

### M. Giŝpling.
### LA LINGVO DE ESPERO



Por kio versas mi en lingvo, kiun konas
Apenaŭ dudek mil stranguloj en la mond'?
Kaj eĉ el tiu kvant' nur tre malvasta rond'
La poezion ŝatas kaj bezonas.

Verdire tio ĉi ne multe min afliktas.
Mi skribas ne por mend', sed sole por mi mem :
El maro de la viv' emerĝas nova tem'
Kaj tekston de l' poem' en tiu lingvo diktas.

Min logas tiu ĉi komuna idiomo –
La lingvo de esper' de Majstro Zamenhof,
Belsona, kiel flut', por poezia strof'
Kaj kuniganta homon kun la homo.

Kaj ne certugu min, ke l' celo estas mita,
Ke en la lingvo mem forestas ĉia senc',
Ke fakte estas ĝi nur revo, nur intenc',
Per kiuj la Infer' jam estas pavimita.

Ligiĝis mia vers' al lingvo Esperanto.
Se ĝi ekzistos plu, do restos mia spur',
Se iam mortos ĝi, do mortos mia kanto…
Sed nun mi versu – juĝu la futur'.

2004 (el la libro «Vespere», 2008)

### М. Гишплинг.
### ЯЗЫК НАДЕЖДЫ



Зачем пишу на языке, который знают
Едва ли в мире двадцать тысяч чудаков?
И кто из этого числа читать готов
Поэзию, а кто и понимает?

Но этот факт меня не очень-то волнует.
Пишу не на заказ, а только для души:
Всплывает тема дня из жизненной глуши
И новый стих на этом языке диктует.

Я восхищаюсь превосходным идиомом.
Язык, что создал наш Маэстро Заменгоф,
Как флейта, благозвучен для ритмичных строф
И делает планету общим домом.

Не утверждайте, что всё это – блажь пиита,
Что никакого смысла в той идее нет,
Что это лишь мечта, благих фантазий бред,
Которыми, как знаем, в ад дорога крыта.

Но навсегда мой стих привязан к эсперанто.
Коль будет жить язык, останется мой след,
А если он умрёт, исчезнет и бельканто…
Лишь Бог решит, насколько прав поэт.

Перевод Людмилы Новиковой (2017)

## DECEMBRO

Ĉu vi scias, ke l' neĝo havas propran odoron? –
La odor' de freŝeco, de purec', de kvieto,
Kiu tiklas naztruojn kaj elpelas angoron,
Kiam fruan matenon mi veturas en sledo.

La unua neĝado, kiu kovras la teron,
Kiu kaŝas la ruston de falintaj folioj –
Ĝi estingas ĝisfine la pasintan someron
Restigante sub cindro iom da fosilioj.

Ĉion, kio turmentis, kio min persekutis,
Kio ŝajnis tre grava pro valoro kaj kosto –
Ĉion ĉi la neĝado dum vesper' superŝutis,
Kaj disblovis la vento kaj katenis la frosto.

Inter kampoj rigidaj trotas mia ĉevalo…
Mi enspiras l' aeron pli vigligan ol kafo…
La ĉapitro finiĝas. Sur la neĝa navalo
Post traflugo de l' sledo restas mia parafo.

2000 (el la libro «Tie ĉi tie» (2003)

## ДЕКАБРЬ

А ты знаешь, что запах также есть и у снега? –
Запах свежести, света, чистоты и покоя.
Он бодрит ранним утром, когда конь резвым бегом
Понесёт мои сани, и расстанусь с хандрой я.

Первый штурм снегопада – новозимняя мета,
Он укрыл ржавость листьев, и покров чист и светел –
Он замёл все остатки улетевшего лета,
Но оставил на сердце сожаления пепел.

Всё, что так волновало, вызывало досаду,
Что казалось бесценным и внимания центром –
Это всё в один вечер занесло снегопадом,
И сковало морозом, и развеяло ветром.

Среди белых просторов конь летит вольной птицей…
Я вдыхаю всей грудью аромат снежных строчек…
Завершаю главу я, и на снежной странице
Я следами полозьев оставляю свой росчерк.

Перевод Людмилы Новиковой (2017)

## *Nekrologe*

# Jefim Semjonoviĉ Zajdman (1937 - 2017)



***Jefim Zajdman, tragike pereinta la 23-an de decembro 2017, naskiĝis en la urbo Simferropolo 08.07.1937, studis en matematika fakultato de la universitato en Ĥarkovo, esperantisto ekde 1957, fondis Esperanto – klubojn en Kolomno kaj en Jalto (“Tero”). Jefim Zajdman estis unu el pioniroj de Sovetia Esperantista Junulara Movado, Esperanto – instruisto, tradukinto kaj aŭtoro de multaj Esperantaj kantoj, Esperanto-ĵurnalisto, fondinto kaj animo de la internacia kanta Esperanto-festivalo “Velura Sezono”, de la Esperanto – renkontiĝo “Aroma Jalto”, kelkaj internaciaj aranĝoj ĉe la kabo Tarhankut, SAT-kongreso en Jalto (2013) kaj Krimeaj Esperanto-Tagoj (2016). Li gvidis teatran esperantistan grupon en Jalta, reĝisoris spektaklojn – en pluraj aranĝoj oni spektis “Krimean legendon” kaj aliajn teatraĵojn. Lia kontribuo por evoluo de Esperanto-kulturo en Sovetunio kaj postsovetiaj landoj estis nesupertaksebla.***

***Dum lastaj jaroj li estis esploranto pri agado de Esperanto–pioniroj. Krome Jefim Zajdman estis turisto, petveturanto, ŝatanto kaj kolektanto de naturaj ŝtonoj kaj mineraloj.***
***En 2006 Jefim Zajdman, respondante al la demando de la redaktoroj de "Komencanto" "Kiel tio komenciĝis" skribis pri si tiun ĉi artikolon, sendis la rakonton pri la festivalo "Velura Sezono" kaj sian originale verkitan rakonton.***

Dum lastaj 44 jaroj de la aktiva agado Esperanto fakte estis por mi vivmaniero.
En 1957 en Moskvo okazis Internacia festivalo de junularo kaj studentoj. Ĉar al la festivalo aliĝis ankaŭ esperantistoj el diversaj landoj, la registaro decidis montri, ke en Sovetunio Esperanto ekzistas kaj permesis anonci pri ĝi en ĵurnaloj. Tiel post 20 jaroj reaperis malnovaj esperantistoj, kiuj ĝis tiam timis elŝovi la verdan nazon. Iuj el ili - el ekzilo kaj malliberejoj.
En tiu tempo mi estis studento de matematika fako de universitato en granda ukrainia urbo Ĥarkovo. Iun tagon, vagante tra la urbo, mi ekvidis surmure anoncon. Oni proponis lerni internacian helpan lingvon Esperanto kaj aldonis adreson por la kontakto. Mi tuj eksentis, ke estas io interesa kaj skribis tien. Responde oni proponis al mi organizi Esperanto-kurson en la fakultato, kion mi faris, kaj rezulte ĉ. 20 studentoj eklernis Esperanton. La instruisto nomiĝis Kotelevcev (la nomon mi ne memoras). Li estis altstatura maljunulo, kiu similis faman rusan verkiston Maksim Gorjkij. En la 37-a jaro, kiam en Ĥarkovo okazis arestado de Esperanto-aktivuloj, li estis fore oficvojaĝanta, kaj kiam li revenis, la planon pri esperantistoj oni jam plenumis kaj li restis viva. Li estis aŭtoro de malgranda Esperanta lernolibro, kiun li uzis por la instruado - rakontis la gramatikajn regulojn kaj ekzemplis – sufiĉe enuiga metodo. Rezulte la kurson finis nur mi, sed ankaŭ mi malmulton ellernis. Tamen mi prenis de li gazetojn "El nuntempa Bulgario", kie estis multaj korespondadresoj, kaj ekkorespondis.
Somere mi feriis en fama ripozurbo Jalto ĉe la Nigra maro, kaj memoras, ke mi provis surplaĝe instrui Esperanton al geamikoj, kvankam mem malbone sciis ĝin. Estis fama "degeltempo" de Ĥruŝĉov, kiam en Jalto unuafoje komencis aperi fremdlandaj ŝipoj kun turistoj. Mi havis eblecon praktiki la anglan. Reveninte al Ĥarkovo, mi hazarde renkontis surstrate la instruiston kaj al lia demando pri Esperanto facilanime respondis, ke okupiĝas nun pri la angla –tranĉilo koren al tiu maljunulo. Poste mi eksciis, ke li estis ege malsana, kiam instruis al ni Esperanton, kaj baldaŭ mortis pensanta, ke lia lasta Esperanto-kurso estis tute vana. Tial mi ofte sentis kulpon, ke ne pravigis lian esperon, kaj estonte, kiam mi iĝis bona esperantisto, tio ĉiam instigis min aktivi.
Post fino de la universitato studentoj de nia fakultato estis devigitaj dum du monatoj ekzerciĝi en milittendaro. Mi memoras, ke tie mi prelegis pri Esperanto kaj rezulte du serĝentoj ekdeziris lerni la lingvon. Mi petis ilin de tempo al tempo aperi dum la militekzercado kaj " ŝteli" min je iuj pretekstoj por ke mi kaŝe instruu al ili Esperanton. Mi estis feliĉa fuĝi de la ekzercoj. Sed mi ĝuste memoras, ke povis instrui nur 200 vortojn – tia estis tiam mia vortprovizo. Mi restigis al ili mian poŝtadreson kaj veturis hejmen. Verŝajne la adreso vagis en la milittendaro kaj trafis manojn de iuj soldatoj. Rezulte post kelkaj monatoj mi ricevis de iu soldato leteron, kiu komenciĝis per frazo "saluton, kara junulino Fima". La afero estas en tio, ke mia germandevena familinomo ne montras sekson. Ankaŭ la karesnomo Jeĉjo en la rusa estas Fima, uzata de viroj kaj virinoj.

Do mi iom korespondis, portis fiere la verdan steleton, sed la lingvon posedis malbone. Mi memoras, ke iam venis al esperantista klubo kaj la unua demanda frazo en Esperanto timigis min.
Aktiva esperantisto mi iĝis nur post fino de la universitato, kiam eklaboris en uzino en la apudmoskva urbo Kolomno. Mi memoras, ke unuan vesperon, kiam mi venis en komunloĝejon de la uzino, mi rimarkis ĉe la lito de unu el la kunloĝantoj lernolibron de Esperanto. Mi tuj vekis lin kaj pridemandis. Klariĝis, ke li kun kelkaj aliaj inĝenieroj decidis lerni la lingvon. La kunloĝanto nomiĝis Ivan Davidkin, li estis elektronikisto, tre edukita homo. Kiam ili eksciis, ke mi korespondas per Esperanto, ili enmanigis al mi la lernolibron kaj petis instrui al ili. Baldaŭ ili veturigis min al moskva Esperanto-klubo. La unua esperantistio, kiun mi renkontis tie, estis artisto Nikolaj Rytjkov, martiro de Esperanto, kiu 18 jarojn pasigis en koncentrejoj, kien trafis en 1937, kiam estis komsomolestro de teatra instituto.
En la sekva 1962-a jaro mi kun la novbakitaj esperantistoj decidis organizi Esperanto-kursojn en la urbo. Ni ricevis permeson de la uzina partia komitato eldoni afiŝon pri Esperanto kaj atendis ĝian aperon el presejo. Oni longe nenion diris al ni pri ĝi, sed hazarde ni eksciis, ke ĝi delonge kuŝas en la urba biblioteko, sed la urba partikomitato decidis ne permesi al ni propagandon de Esperanto. Tial ni venis al la biblioteko kaj mensogis, ke oni sendis nin preni la afiŝojn. Samvespere ni dispendigis ĉiujn afiŝojn en la plej vizitindaj lokoj de la urbo kaj komencis prepariĝi al la prelego, kies loko kaj tempo estis anoncitaj en la afiŝoj. En tiu tempo mi ankoraŭ ne povis paroli Esperante, sed multe legis Esperantajn gazetojn. Ĉion, kion mi povis elsuĉi el la gazetoj pri la lingvo kaj movado, mi naive rakontis dum la prelego. Krome mi invitis el Moskvo la artiston Nikolaj Rytjkov, kiu bele kontribuis per deklamado. La aranĝo daŭris 5 horojn(!) kaj neniu el la 500(!) aŭskultantoj forlasis la halon. Mi ankaŭ memoras, ke instruistino de la angla lingvo de unu el la lernejoj venis kun la tuta klaso.
Sekvamatene komenciĝis registrado de kursanoj. Kiam la nombro de la dezirantoj atingis… 300, ni ĉesis la registradon kaj decidis organizi 3 Esperanto-kursojn: la urban, en la uzino kaj en la lernejo. La uzinan decidis gvidi mi, en la lernejo Ivan Davidkin kaj al la urba ni invitis du moskvajn esperantistojn, al kiuj promesis pripagi kaj la vojon tien-reen kaj la instruadon. Ili unufoje veturis elektrotrajne dum 2 horoj, instruis, revenis… kaj rifuzis. Rezulte mi estis devigita ekinstrui ankaŭ en la urba kurso. Post kelkaj lecionoj komenciĝis neklarigeblaj eventoj. Ĉiuj kolektiĝas por vica leciono, sed la ejo (kutime ĝi estis legejo) estas fermita aŭ oni je iu preteksto diris, ke ne plu eblas disponigi ĝin al ni. La samo okazis en la uzino, kie ni kelkfoje ŝanĝis la ĉambretojn ĉe diversaj uzinaj laborejoj. Baldaŭ ni komprenis, ke tio estas "mano de KGB" (Komitato de ŝtata sekureco).
Pro la malfacilaĵoj ni ĉiufoje perdis po kelkaj kursanoj. Feliĉe baldaŭ komenciĝis varma aprilo kaj ni lokiĝis sur ŝtuparo de stadiono. Ankaŭ ĉi tie tuj aperis obstakloj (komenciĝis tre laŭta, surdiga muziko), sed post kelkaj lecionoj la surdiganto verŝajne laciĝis kaj ĉesis malhelpi.
Por gvidi la kursojn mi uzis konatan bonegan lernolibron "Praktika kurso de Esperanto por angle parolantaj landoj". Fine de la kurso mi jam scipovis paroli Esperante, ankaŭ la plej bonaj el la kursanoj. Kaj preskaŭ tuj post la kurso mi veturigis 7 kursanojn al la 4-a Balta Esperanto-tendaro, kiu okazis en la urbeto Cesis (Latvio). Tiel komenciĝis mia aktiva Esperanto-agado. Tio estis la jaro 1962.

Poste en Kolomno aperis aktiva junulara esperantista grupo, mi komencis verki kaj traduki al Esperanto kantojn, partoprenis kreon de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado) – estis unua gvidanto de ĝia kultura fako. En la 1974-a mi revenis al Jalto kaj fondis tie junularan esperantistan grupon "Tero" (kurtigo de "Turista Esperanto-Rondo") ĉe jalta klubo de montgrimpantoj, kiu poste fariĝis urba Esperanto-klubo "Tero". Sekvajare ni festos 30-jariĝon de la klubo.
Dum 44 jaroj de la aktiva agado Esperanto fakte estis por mi vivmaniero. Dank' al ĝi mi estis inter la unuaj petveturantoj, fariĝis turisto, tradukanto kaj aŭtoro de Esperantaj kantoj, organizanto de la internacia kanta Eesperanto-festivalo, Esperanto-ĵurnalisto kaj lastatempe esploranto pri agado de Esperanto-pioniroj (rezulte en la centro de la urbo aperis du memortabuloj omaĝe al famaj Esperanto-pioniroj).
*"Komencanto", 2006 № 4, paĝoj 3-4*

## Velura sezono

La unua festivalo okazis en la jaro 1979, en arbaro apud Jalto. Mi memoras, ke inter la partoprenantoj estis kantistoj Andreo Peĉonkin el Krasnojarsko, Leonid Borisov el Kolomno kaj G. Ŝilo, kiu prezentis teatraĵeton "Juĝproceso". Sekvaj du festivaloj okazis ankaŭ enarbare, sed ĉe Foros.
En 1981 la junulara Esperanto-grupo "Tero" (Turista E-Rondo) fariĝis la urba Esperanto-klubo "Tero" kaj ekde tiu tempo aperis ebleco organizi la festivalon oficiale, enurbe sub la nomo "Internacia semajno de amikeco".
La festivalo estis unu el la plej popularaj Esperantaj aranĝoj en la eksa Sovetunio. Ĝin partoprenis esperantistoj el multaj respublikoj (plej multe el Ukrainio, Rusio, Litovio, Kartvelio), inter kiuj estis muzikistoj, artistoj kaj ŝatantoj de Esperantaj kantoj. En la 1982-a jaro dum "Velura Sezono-4" cento da esperantistoj grimpis al ebenaĵplato Beŝ-Tekne, kie en la kaverno "Tatjana" aŭskultis Baĥ-koncerton. Speciale por tio ni motorcikle liveris tien orgenon. Unuafoje en la historio de Krimeo okazis tia aranĝo, informoj pri ĝi aperis en tutlandaj ĵurnaloj (sed sen vorto "Esperanto").
Multaj Esperanto-artistoj fariĝis laŭreatoj de la festivaloj: Leningrada Esperanto-teatro (A.Iovlev, G.Rudenko, O.Popkov, N.Lavrov), reĝisoro de Kieva pupteatro Sergeo Jefremov, Ĵomart Amzeev, Vladimir Soroka, Mikaelo Bronŝtejn, Anatolij Radajev, Mikaelo Povorin, Marina Korotj, Natalia Berce, Leonid Borisov, Igor Fortuŝnij, Dajva Medzeviĉute, Tim Sobakin (Andrej Ivanov), kaj multaj aliaj.
Multaj muzikistoj interkonatiĝis dum la festivaloj, kelkaj eĉ transloĝiĝis al Jalto kaj ĉe la Esperanto-klubo aperis bonega esperantista ensemblo gvidata de Vladimir Soroka. En la 1986-a jaro Ĉe la klubo aperis la unua urba barda klubo "Tero", unusola en la lando barda klubo, kie aŭtoraj kantoj sonis en diversaj lingvoj.
"Velura Sezono-9" estis la lasta, la festivalo renaskiĝis nur post 16 jaroj. Sed ĝi havas jam alian vizaĝon. Ĝia ĉefa celo iĝis propagando de Esperanto por loĝantoj de Jalto kaj ties multenombraj turistoj, ĉar aperis novaj eblecoj. La koncertoj okazas en la granda halo de la urba kulturcentro kaj sur la ĉefa placo, pri kiuj surstrate anoncas grandaj afiŝoj. Krome okazas improvizaj koncertoj sur la kajo cele allogi homojn al la koncertoj en la halo. Dum la koncertoj ni disdonas flugfoliojn. Dum la festivaloj nepre okazas gazetaraj konferencoj. Jam dufoje la festivalon partoprenis JoMo (Jean Marc Leclerc, Francio), pasintjare - pioniro de la Esperanta rokmuziko Kim Henriksen.

*"Komencanto", 2006 № 4, paĝo 4*

# *Originala prozo*

## Legendo pri Kniŝ

***Jefim Zajdman***

*Enkonduko*
— Ĉu vi ŝatas verkojn de Jack London? - demandis min iam amiko.
— Tre! - respondis mi tuj.
— Ankaŭ mi - diris mia konato,- tamen...
— Kio "tamen" ?- ekkris mi.
— ...Tamen malnoviĝis li iom, necesas lin redakti kaj modernigi. Jen mi tralegos al Vi.

Antaŭnelonge en Odeso ĉe la varma suda bordo loĝis Boĉjo Kniŝ. Boĉjo estis komprenema knabo, sana kaj forta. Krom tio li lernis en mezlernejo. Unu knabo en lia korto havis motorbiciklon. De tempo al tempo li permesis al la amikoj preni ĝin. Ankaŭ Kniŝ unufoje petis ĝin por veturadi tra la korto, sed tiu rifuzis doni. La korta knabaro same estis kontraŭ.
— For lin! - ekkriis la pli aĝaj knaboj. — Prenu tiun ĉi knabeton kaj enlitigu lin. Tro junas li ankoraŭ por motorbiciklo.
Kniŝ ne ektimis. Li trankvile atendis ĝis (tiu tempo, kiam) ĉiuj eksilentos.
— Mi baldaŭ havos mian propran motorbiciklon, eĉ motorciklon, - trankvile diris li, - kaj ĉiuj en la korto havos eblecon ĝissate veturadi.
— Ekde kiu tempo beboj komencis instrui nin, virojn, vivi? - laŭtege demandis komsomolano Buldiga, kiu tiuvespere, kiel kutime, kartludis enkorte. Kniŝ eksaltis.
— Aŭskultu min, Vi, viroj- ekkriis li,- Neniam mi parolos kun iu el Vi, neniam. Nur post kiam Vi venos al mi kaj diros: "Parolu, Kniŝ, ni volas, ke Vi parolu".
Per rido kaj mokoj akompanis la knabaro lin, kiam li iris hejmen. Sed li kunpremis la dentojn kaj silente foriris, rigardante nek dekstren, nek maldekstren.
Sekvatage li direktis sin ien en la urbo. Tiuj, kiuj vidis lin, rimarkis, ke li kunprenis aron da malnovaj ĵurnaloj kaj ujon por rubo. Kaj multe oni parolis kaj multe ridis ĉi-rilate. Ankoraŭ neniam okazis, ke kontraŭ aro da paperaĉoj kaj rubo oni povus aĉeti motorbiciklon, des pli motorciklon. La pli aĝaj knaboj nur balancis perkape kaj silentis, kaj malpliaĝuloj rigardis lin kompate. "Li baldaŭ revenos", - parolis ili.
— Iru li. Estu tio bona leciono por li - parolis la pli aĝaj, - li revenos baldaŭ silenta kaj obeema, kaj vortoj liaj estos humilaj. Jes, ĝi estis stulta ideo. Sed pasis tago, kaj dua, kaj tria, ĉiuj jam komencis forgesi pri la incidento, kiam je kvara tago li alveturis motorcikle. Kaj iom poste oni alveturigis por li magnetofonon kaj gitaron.
En la korto oni komencis paroleti pri ŝtelado. Komsomolano Buldiga ekde tiam ne tiom kartludis vespere, kiom kaŝobservis la knabeton, sed vane.
— Oni kulpigos Vin je ŝtelado,- minace diris unutage la posedanto de motor-biciklo.
— Kiu povas kulpigi min je ŝtelado, - trankvile respondis Kniŝ, - Vi simple envias min. La konkuranto foriris honte kaj eĉ la etuloj ridis al lia dorso. Sed iutage, kiam Kniŝ alveturis per la motorciklo en moderna sporta vesto, la pacienco finiĝis. Oni invitis lin al la plej bona loko - al la tablo sub la arbo, kie kutime la plej gravaj homoj sidadis, kartludis kaj drinketis "je triopo".


— Vi devas klarigi al ni ĉion, ho Kniŝ. Diru, kiel Vi ricevas ĉiujn tiujn bonegajn aĵojn. Ĉu ne per ŝtelado? - demandis onklo Ivaĉjo, kiu okaze de la tiom grava afero estis preskaŭ malebria. Kniŝ levis supren la okulojn kaj ekridetis.
— Ho ne, onklo Ivaĉjo! Ŝtelado ne estas inda afero por lernanto. Mi nur elpensis metodon, kiel facile gajni per la loterio. Ĝi estas lertaĵo, sed ne ŝtelo. Ekestis longa silento.
— Kaj ĉu Vi... Vi rakontos al ni, ho, Kniŝ?- demandis fine onklo Ivaĉjo per tremanta voĉo.
— Jes, mi rakontos. Estas tre simple. Vi prenas pasintjarajn ĵurnalojn kun rezultoj de la loterio kaj dispendigas ilin en tago, kiam aperas rezultoj de la nova loterio, sur dommuroj en necentraj stratoj. Apude starigu ujojn por rubaĵo. Kutime homoj ne rigardas daton de la ĵurnalo, kontrolas siajn biletojn kaj, vidinte ke ne gajnis, forĵetas ilin en la rubaĵujon. Vespere mi ĉirkaŭiras la "kaptilojn", kolektas la forĵetitajn biletojn kaj kontrolas ilin kun helpo de la vera ĵurnalo. Estas tre simple.
Kaj onklo Ivaĉjo ekkriis: - “Ho!”
Kaj komsomolano Buldiga diris: - “Ha”! Kaj ĉiu diris siamaniere, sed ĉiuj komprenis.
Tiel finiĝas legendo pri Kniŝ, kiu vivis en Odeso ĉe la varma suda maro. Kaj ĉar Kniŝ agis per lertaĵo, sed ne ŝtelo, li iĝis la plej estimata persono en la korto.

***
Nu kiel?- demandis min la konato, fininte legi,- ne estu tro severa, ĝi estas mia unua traduko. Nun mi plimodernigas romanon "Anna Karenina" - estos grandioze!
“Komencanto”, 2006 № 4, paĝo 5

## *Tradukita prozo*

# Nikolao Bajkov (1872-1958).

*Nikolao Bajkov naskiĝis en Kievo en 1872, kaj apartenis al antikva nobela dinastio. En 1882 li iĝis lernanto de la Dua klasika gimnazio en Kievo, kaj poste li trafis en la Kadetan lernejon. En 1894 oni sendis lin militservi en Kaŭkazon. En komenco de nova jarcento 28 jaraĝa Nikolao Bajkov komencas novan vivon kiel sendependa persono, oficiro. Vintre en 1901li forveturas al malproksima Manĉurio.*
*Tie komenciĝas literatura agado de Nikolao Bajkov. En 1915 estis publikigita lia unua libro «En montaro kaj arbaroj de Manĉurio».*
*Sed en tempo de militaj elprovadoj li kiel oficiro aktive partoprenis en militoj kontraŭ Japanio kaj Germanio, estis vundita, ricevis ordenojn pro bataloj, kaj renkontis revolucion en 1917 jam kiel kolonelo. Pro politika situacio en Rusio li kun blankgvardianoj devis elmigri, kaj post multaj vagadoj en 1922 li revenis al Manĉurio, en Harbinon. Sume li travivis preskaŭ 50 jarojn en Harbino – insulo de rusa kulturo sur manĉura tero. Sed en fino de 20-aj jaroj politika situacio en Rusio tre ŝanĝiĝis. Preskaŭ ĉiuj rusaj elmigrantoj plenigis nigran liston de «malamikoj de la popolo». Ankaŭ trafis en la liston tute malkulpa antaŭ sia patrolando Nikolao Bajkov. Pro tio ĉiuj liaj rimarkindaj libroj pri manĉuraj tigro, urso, ginsengo estis eldonitaj ne en lia patrolando, sed en malproksima Harbino.*



*Nikolao Bajkov estis granda majstro de aventura ĝenro. Plej multaj liaj verkoj estis dediĉitaj al interesaj historietoj el vivo de ĉasistoj en for-orienta tajgo. Tion indikas nomoj de liaj libroj: «En sovaĝejo de Manĉurio» (1934), «Tajgo bruas» (1938), «Ĉe bivakfajro» (1939), «Memornotoj de manĉuria ĉasisto» (1941), «Tajgaj padoj» (1943).*
*Aparta okupo por Nikolao Bajkov estis ĉasado kontraŭ tigroj. Li gloriĝis inter lokaj loĝantoj per tio, ke mortigis la Grandan Wang-on, egan tigro-hommanĝulon. Lia novelo «La Granda Wang» (1936) alportis al li mondan famon. Ĝi estis tradukita al multaj lingvoj de la Orienta Azio. Unuafoje kiel aparta libro la novelo estis eldonita en Japanio en 1941.*
*En 1955 Nikolao Bajkov lasis Harbinon kaj forveturis al Aŭstralio kie mortis en 1958.*
*Ĉi tie estas prezentata XXVI-a ĉapitro «La leĝo de tajgo» el novelo - «La Granda Wang».*

# La leĝo de tajgo

Montoj kaj arbaroj frostiĝis sub glacia spirado de norda ciklono, kiu kovris tiujn per blanka mortotuko de oldulino-vintro.
Komenciĝis ĉasado kontraŭ valorfelaj bestoj. La entrepreno intensis kaj disvastiĝis.
En mizeraj *fanzoj**, travintrejoj, sur tajgaj padetoj aktivis laboro. Oni preparis kaj instalis diversajn kaptilojn, fosis enfalujojn kaj metis maŝojn por kaptado.
Felojn de kaptitaj bestoj oni bone sekigis kaj metis en specifan konservejojn en fanzoj aŭ en kavo de arbotrunko, kie troviĝis specialaj kaŝejoj – tajgaj kiraskestoj.
Kvankam severa leĝo de tajgo malpermesas ŝteladon de la feloj, tiuj estis zorge gardataj, tamen ne kontraŭ ŝtelemaj homoj, sed kontraŭ etaj arbaraj ŝtelantoj – musoj, mikrotoj kaj sorikoj.
La leĝo de tajgo estas la plej antikva inter ĉiuj juraj direktivoj de la homo. Tiu neskribita kodekso naskiĝis en pratempo, kiam homaro ankoraŭ troviĝis en infana aĝo, kiam lukto por ekzistado dependis de posedo de fizika forto, kaj rajto por vivi estis tre multekosta.
Tiu rajto, ellaborita de sovaĝa praa naturo, kiel postrestaĵo konserviĝis ĝis nun en landoj, kie ankoraŭ postrestis virgaj arbaroj kaj stepoj, kie homoj troviĝas en la plej primitivaj kondiĉoj de vivado.
Iom post iom la rajto transformiĝis en kutiman rajton kaj akiris aspekton de leĝo, kiun difinis la vivo mem, cirkonstancoj kaj lokaj kondiĉoj.
La rajto estas senkompata kiel naturo mem, kaj fremda al indulgo kaj sentimentaleco.
Humanaj trajtoj en ĝi tute forestas, kaj justeco estas tro senartifika.
Ĉefa dogmo de la leĝo – okulon pro okulo, denton pro dento.

Laŭ la leĝo, ŝtelado de feloj puniĝas per mortigo.
Ignori la leĝon oni ne rajtas, kaj kulpulo ne povas eviti punon eĉ tiuokaze, se tiu provos defendi sin per ŝtataj leĝoj.
La punanta, senkompata mano de tajga Nemezo finfine trovos la kulpulon, kaj la kutima rajto de sovaĝa dezerto triumfos.
La leĝo ne kontesteblas, kaj konservas sian purecon en profundo de sovaĝa tajgo.
Fanzo de olda Tong-Li estas plen-plena de homoj.
Kun longa pipo en la dentoj, kalkansidas sur *kano** sindikoj de ĉasterenoj. Kvin personoj kun Tong-Li.
Profundaj faltoj kaj pergamena bronza haŭto sur la manoj kaj vizaĝo, atestas, ke ili atingis aĝon, kiam oni devas respekti kaj estimi tiujn.
Sur planko ĉe kano genuas juna ĉino. Liaj brakoj estas kunligitaj ĉe la kubutoj. Laŭ vesto li aspektas kiel laboristo. Lia mieno aspektas stulta kaj ŝajnas indiferenta.
Apude sur tera planko kaŭras ankoraŭ kvin personoj. Iuj fumas, iuj atente aŭskultas.
Tio estas tajga juĝo. La sindikoj – juĝantoj. La kunligita homo – akuzata pri ŝtelado de du zibelaj feloj, apartenantaj al lia mastro-kaptilisto, kiu sidas apude sur planko.
Ceteraj homoj – eskortantoj kaj ekzekuciantoj, kiuj plenumas verdikton de la juĝo.
Lumeto de vintra tago tra oleita papero de eta fenestro ĵetis svagajn rebrilojn sur nigran internon de la fanzo kaj sur mornajn homfigurojn en la juĝejo.
Tong-Li estis elektita kiel sindiko.
«Antaŭ ni – Song-Fa! - li diris, rigardante al la juĝantoj, - li ŝtelis du zibelajn felojn de sia mastro, estimata kaptilisto Fa-Ling».
«Song-Fa! Ĉu mi pravas, aŭ ne?»- li turnis sin al la akuzato.
«Jes, vi pravas, - mallaŭte prononcis Song-Fa, - sed neceso provokis min al ŝtelado: vendinte la felojn, mi nutrigus mian mortantan patrinon! ».
«Tio ne rilatas al ni, - obĵetis Tong-Li. – vi faris tre grandan krimon, vi ŝtelis! Por savi la patrinon kontraŭ malsato al vi necesus preni nur unu felon».
Song-Fa ne respondis, kaj liaj sensangaj lipoj balbutis ion.
«Nun ni voĉdonu», - li turnis sin al la juĝantoj, kiuj ŝajnis indiferentaj al tio, kio okazas.
Dum alvoko Tong-Li metis antaŭ ili malplenan ladskatolon, kaj disdonis al ĉiu kaj ankaŭ al si mem po du fabojn, nigran kaj blankan.
«Song-Fa konfesis sian kulpon! – la oldulo daŭrigis paroli, - kaj nun ni devas decidi, ĉu puni lin aŭ ne?».
«Blanka fabo – morto, nigra fabo – vivo. Ĵetu la fabojn en la ladskatolon! » - diris Tong-Li, kaj kun la ladskatolo aliris al ĉiu juĝanto, kiu ĵetis sian fabon.
Sonoj de falantaj faboj kiel batoj de martelo frapis la kapon de Song-Fa.
Ĵetinte en la ladskatolon nigran fabon, Tong-Li elŝutis ĉiujn fabojn sur maton de la kano.
Ĉiuj etendante la kapojn scivole rigardis rezulton de la voĉdonoj.
Sur la mato kuŝis kvar blankaj faboj kaj unu la nigra.
Sorto de la akuzato estis difinita.
Prononcante nek unu vorton, Tong-Li kolektis la fabojn kaj metis la ladskatolon sur breton. Ĉiuj leviĝis sur la piedojn, kaj la olda kaptilisto turnis sin al Song-Fa kaj diris: «Vi estas kondamnita al morto. Somere oni enterigus vin vivanta, sed nun estas vintro, kaj frosto malmoligis teron.
Anstataŭ tio oni fordonos vin al la Granda Wang, kiu postulas hom-oferon. Se Wang indulgos vin – via feliĉo. Ĝi difinu vian sorton».

Verŝajne Song-Fa pretiĝis al ĉio, kaj apatie aŭskultis la verdikton. Nek unu muskolo moviĝis sur lia malhela vizaĝo.
Laŭ estanta moro al akuzito antaŭ la morto oni proponis delikatan pladon el viandaj pelmenoj kaj nelimigitan kvanton da varma vodko.
Ege ebriiĝintan Song-Fa-n oni kuŝigis sur kanon kaj devigis lin elfumi kelke da opiaj globetoj, pro kiuj li tre stultiĝis kaj duonsvenis.
Pasis du horoj post la juĝo. Oni laŭ padeto alkondukis Song-Fa-n al intermonto Cong-Ling, kie troviĝis piedpremita tigra pado, laŭ kiu ĉiutage vagadas rabobestoj, farante siajn ĉasantajn ekskursojn.
Sur akvodislimo mem de la intermonto kreskas olda giganta cedro. Ĝia fiera pinto, strebanta ĉielen, mallumiĝas super malataj kopsoj.
Nek uraganoj, nek printempaj ciklonoj sukcesis venki tiun tajgan fortegulon de flaŭro. Ĝi staras unusola en montara dezerto, kaj alkroĉiĝas per siaj fortikaj radikoj al granito en rokfendoj.
Al tiu fortegulo oni per ŝnuroj alfiksis Song-Fa-n.
Por ke li ne frostiĝu, oni vestis lin per varma vata bluzo kaj pantalono, kaj surkapigis felan ĉapon.
Sub influo de la narkotaĵo li ekscitiĝis, konstante gestis, kantis, laŭte preĝis al la Montara Spirito.
Lia malklara rigardo de temp' al tempo ekflamis, kaj tiam li vidis figurojn de siaj parencoj kaj praŭloj, kiuj vizitis al li por konsoli lin antaŭ lia morto.
Suno jam kaŝiĝis malantaŭ arboriĉaj branĉoj de Lao-E-Ling. En tajgo kuŝis noktaj ombroj, kaj nur blankneĝa montsupro de Tatudinzi, farbita de ora sunsubiro, flamis en blua vespera ĉielo.
Solena tajga kvieto rompiĝis nur per ekkrioj de demenca Song-Fa.
Sed jen en densejo krakis unu branĉo, poste la alia. Aŭdiĝis molaj paŝoj de ies piedoj sur rompebla neĝo.
El densaĵo de pikaj aralioj, plektitaj de sarmento, subite glitis du mallumaj figuroj, longaj kiel serpentoj, kaj malaperis post neĝamaso.
Ekregis angora silento. Song-Fa finis krii kaj atente aŭskultis. Rabobestoj, farante sian kutiman ĉirkaŭiron, defore ekaŭdis strangajn sonojn de homa voĉo, kaj penis esti nerimarkeblaj.
El densejo ili vidis arbarkampon kaj sur ĝi cedron al kiu estis alligita homo.
Kompreninte ĉion, tigroj unu post la alia eliris el sia embusko sur la arbarkampon kaj haltis, rigardante per rondaj brilaj pupiloj al malluma figuro de la homo.
Vidante siajn terurajn ekzekutantojn, Song-Fa tuj malebriiĝis, kaj lia sobra rigardo koncentriĝis al mallumaj senmovaj siluetoj de la bestoj.
Kio estas tio? Ĉu halucino aŭ realo? Ĉu deliro de malsana imago aŭ personigita morto? Lia malforta menso komencis malklariĝi.
Stulte kaj sensence li rigardis antaŭen, kaj komencis melankolian kaj malĝojan kanton de morto.
Monotonaj kaj enuigaj sonoj de la kanto aŭdiĝis en nokta kvieto kaj profundiĝis montaran sovaĝejon.
Pli proksime al la cedro, staris juna tigrino, kaj post ĝi troviĝis altstatura grandega figuro de Wang.
La bestoj staris perpleksaj, atente aŭskultante nekompreneblajn sonojn. Pintoj de iliaj vostoj zigzagis kaj nervoze tremetis.

Finfine unua rekonsciiĝis Wang. Ĝi preteriris sian amikinon kaj proksimiĝis al la cedro.
Freneza rigardo de Song-Fa renkontiĝis tre proksime al sovaĝa flama rigardo de la besto. Ili longe interrigardis ĝis kiam aliris la tigrino. Tiam Wang returnis sin al ĝi kaj diris ion en sia besta lingvo.
Priflarinte la kapon kaj manojn de Song-Fa, la tigrino ekroris, sentante sangon kaj varman viandon. Post unua frapo per sia peza antaŭa piedo ĝi devigis la homon eksilenti. La fela ĉapo falis de sur lia kapo.
Post dua frapo kontraŭ la malkovrita kranio, la tigrino nudigis la cerbon sur la nuko. El la disŝiritaj arterioj ekŝprucis la sango.
Ne pasis eĉ kvaronhoro, sed de la homo restis nuraj sangokovritaj pecoj de viando, ostoj kaj tendenoj. Ebriiĝintaj de sango, la rabobestoj ŝiris for de ŝnuro pecojn de la homa karno, kaj tuj formanĝis tiujn, ronronante kaj ŝmacante per siaj fortaj makzeloj.
Satiginte sin kaj puriginte sian luksan felon, la tigroj iris plu laŭ padeto, kaj malaperis en proksima aro de ŝtonoj, plektitaj de aralioj kaj lianoj.
Sur loko de la ekzekuto, sub la centjara cedro senorde kuŝis sur sangokovrita neĝo vataj ĉifonoj, fela ĉapo kaj restaĵoj de ŝnuro, per kiu oni ligis la krimulon. Jen ĉio, kio restis de malfeliĉa Song-Fa.
Tajga justico jubilis.
La Granda Wang estis juĝanto kaj ekzekucianto de antikva leĝo de dezerto. Denove aperis solena kvieto.
Defore aŭdiĝis rorado de juna tigro. Komenciĝis «la bestaj noktoj». Baldaŭ al la malĝojaj restaĵoj de tajga dramo, logataj de akra odoro de sango, alvenis ruĝaj lupoj.
***Kano** (ĉin. *Kàng )* — lokita laŭ muro malalta ŝtona aŭ argila elstaraĵo, uzata kiel kuŝejo, sub kiu etendiĝas forna tubo.
***Fanzo** (ĉin. *Fángzi )* – tradicia domo en Ĉinio.

***Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko***
***(E-klubo "Pacifiko", Vladivostoko)***

## *Instruado*

# Tipoj de Esperanto-kursoj

## *Vladimir Opletajev (Surguto)*

Tiu ĉi artikolo celas studi temon de klasifiko de Esperanto-kursoj kaj konkludi el la haveblaj materialoj pri konkretaj kriterioj kaj distingiloj, al kiuj subiĝas diversaj tipoj de kursoj.
Violin Oljanov antaŭ kvardek jaroj kun ĉagreno eksklamaciis pri “la manko de bonaj Esperanto-instruistoj, flamantaj en sia laboro, spertaj Esperanto-lingvistoj, kapablaj edukistoj kaj metodikistoj...”[1, paĝo 133] Ĉu la situacio ŝanĝiĝis? Jes, ni estas atestantoj de tute nova teknologia epoko, kiu kaŭzis ŝanĝojn en ĉiuj sferoj de la socia vivo, sendube ankaŭ en la instruado de Esperanto: aperis modernaj teknikaj rimedoj kaj instrumaterialoj por pli kvalite antaŭenigi la instruprocezon, pli vastaj iĝis kontaktoj inter instruistoj de Esperanto, akceliĝis informfluoj kaj

spertinterŝanĝoj. Ĉiujare centoj da doktaj kaj talentaj instruistoj kaj instruantoj de Esperanto en diversaj partoj de la mondo organizas kaj gvidas diversnivelajn kursojn, perante al lernantoj ne nur siajn sciojn kaj spertojn sed ankaŭ sian sinceran amon al Esperanto.



Sekvantoj de informoj pri aktualaj kursoj, gvidataj en la mondo povas konvinkiĝi pri ekskluziva diverseco de iliaj anoncataj titoloj kaj tipoj, foje tre neordinaraj kaj eĉ ekzotaj, ke fakte aperas problemo de tipologia esploro kaj distingo inter la diversaj kaj pluraj kursotipoj t.e. klasifiki laŭ apartaj kriterioj kaj sisteme ordigi ilin. Kriterio estas distingilo, helpe de kiu efektiviĝas ĉia taksado kaj klasifikado. [2] La kriterio devas malkovri plej gravajn karakterizajn ecojn de aparta kurso. Kiam oni diras, ke iu vizitis kaj finis bibliotekan kurson de Esperanto, liveriĝas neniu konkreta informo pri la koncerna kurso kaj ĝia specifa tipo krom ĝia lokalizo en la biblioteko. Apenaŭ kredeblas, ke tio estas la plej grava kaj unuaranga kriterio por difini la tipon de kurso, ĉar kursoj de Esperanto estas okazigataj ĉe plej diversaj edukaj, kulturaj kaj aliaj publikaj institucioj. Preskaŭ ĉiuj ekzemploj en la teksto fontas el la instrupraktiko de rusiaj Esperanto-instruantoj kadre de movadaj kursoj.

**1. Kriterio - statuso de kursoj**
**Oficialaj (nedevigaj) kursoj:**
**- lernejaj kursoj;**
**- kolegiaj kursoj;**
**- universitataj kursoj.**
**Neoficialaj kursoj:**
**- movadaj kursoj.**

Oni devas distingi inter du grupoj de kursoj: oficialaj kaj neoficialaj. La deviga instruado de Esperanto, kiel parto de ŝtataj instruprogramoj, en Rusio ne ekzistas, kaj la oficialaj kursoj estas organizataj kaj gvidataj kutime sub la aŭspicioj de edukaj, sciencaj, kulturklerigaj kaj aliaj institucioj, posedantaj licencon pri edukaj kaj instruaj rajtoj kaj servoj kaj akredititaj ĉe koncernaj departamentoj aŭ ministerioj. Se Esperanto-kursoj posedas oficialan lernejan aŭ universitatan statuson, iliaj gvidantoj devas havi konfirmitan instruplanon, aprobitan programon, instrumaterialojn (lernolibron), fiksitajn metodojn de taksado de lingvokonoj kaj atestado de kursanoj. Al tiu ĉi tipo de kursoj en Rusia Federacio apartenas kutime fakultativaj lernejaj kaj diversgradaj universitataj kursoj, libervole elekteblaj de lernantoj kaj studentoj el akcesora varia t.e. el ne deviga parto de studobjektoj. En

Rusio tiaj kursoj povas funkcii ĉe mezaj lernejoj, kolegioj, universitatoj, se estas konsento aŭ permeso de instituciaj aŭtoritatoj, kvalifikitaj instruistoj kaj dezirantoj lerni Esperanton. Kiel ekzemplo de oficialaj universitataj kursoj menciindas la kursoj, gvidataj ekde 2014 de Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova ĉe Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) en Moskvo. [3] Iliaj kursoj funkcias kadre de akcesora profesia klerigo, kaj post la sukcesa ekzameno la kursfinintoj ricevas universitatajn atestilon aŭ diplomon pri plialtigo de kvalifiko, kio estas oficiala aldonaĵo al la jam ricevita universitata diplomo.
La neoficialaj kursoj funkcias senlicence, iliaj gvidantoj ne bezonas aprobon de dokumentoj; tiaj kursoj okazas kutime kiel formo de kluba laboro, kaj la kursfinintoj, eĉ se ili trapasas seriozan ekzamenon fine de la studado, ne rajtas ricevi oficialajn ŝtatajn atestilojn aŭ diplomojn. Tiaspecaj kursoj estas nomataj movadaj kursoj. Kutime Ili estas organizataj de esperantistaj kluboj, societoj, rondetoj, apartaj esperantistoj en diversaj kulturklerigaj oficejoj: junularaj kluboj, lernejoj, bibliotekoj, kulturpalacoj, en privataj apartamentoj ktp. Movadajn kursojn gvidas kiel profesiaj instruistoj tiel ofte ankaŭ amatoraj instruantoj de Esperanto aŭ trejnitaj Esperanto-instruistoj.

**2. Kriterio - lingvonivela aspekto:**
- **bazaj kursoj** (por komencantoj = A1, A2);
- **daŭrigaj / progresigaj / perfektigaj kursoj** (por komencintoj = A2 – B1 – B2);
- **altnivelaj kursoj** (por progresantoj kaj flue parolantaj esperantistoj = B2 – C1 – C2);
- **fakaj kursoj.**

Teorie kursojn eblas organizi aparte por ĉiu lingva nivelo, detale prezentita en la Komunaj Eŭropaj Referenckadroj konforme al la laŭŝtupa taksilo de lingvokonoj kaj kapabloj kun ilia disbranĉiĝo je baznivela, meznivela kaj profesinivela lingvouzadoj. [4, paĝoj 14 - 15 ] Sed praktike al movadaj kursoj aliĝas homoj lingve diversnivele orientitaj, kun malsamaj lingvaj spertoj kaj kapabloj kaj rezulte ĉe la sama starto kursanoj ofte atingas malsamajn nivelojn kursofine. Sekve limoj inter diversaj ŝtupoj ne ĉiam estas precize markitaj, same kiel celataj rezultoj. Ekzemple en la Uralaj lingvotrejnadoj la B-nivelaj kursoj unuigas esperantistojn, kies lingvaj niveloj varias de A2 ĝis B2 kaj eĉ C1, sed la kursgvidantoj, preparante lecionojn, orientiĝas mezume al la niveloj B1, B2, kaj tio funkcias bone.
Kvante la bazaj movadaj kursoj multoble pli superas la progresigajn, kaj ĉi tiu fakto malkaŝas akcesorajn problemojn, ligitajn kun malefika laborplanado de apartaj kluboj, kiuj ofte lasas komencantojn post la baza kurso plu drivi memstare sen aparta zorgo pri ilia perfektiĝo.
Sed se la lernomotivoj daŭre stabilas pro konkretaj atingotaj kaj dezirataj celoj, ankaŭ la progresigaj kaj altnivelaj kursoj iĝas efikaj. Ekzemple, la kernon de la printempa regiona renkontiĝo EsPrimo-4 en Tjumeno konsistigis la kurso de profesoro Aleksandr Melnikov (Rostovo-ĉe-Dono) pri vortludoj en Esperanto kaj fonaj scioj de esperantistoj. Menciindas la sukcesa sperto de Aleksandr Osincev el Jekaterinburgo, kiu gvidis kelkmonatan gramatikan kurson cele al lingva pliperfektigo de samklubanoj antaŭ la KER-ekzameno. Irina Gonĉarova (MEA MASI) tradicie post la baza parola kurso FaRo gvidas daŭrigan kurson ĉirkaŭ dudekhoran, per kiu ŝi strebas pli funde peri al kursfinintoj lingvajn strukturojn kaj gramatikajn fajnaĵojn de Esperanto, prepari lernantojn al la KER-ekzameno, amikigi

kaj aktive enkomunumigi novajn esperantistojn. Ekzemple en 2016 el 8 ekzamenitoj dum Moskva sesio de la KER-ekzameno 7 estis finintoj de FaRo kaj de la daŭriga kurso.
Movadaj fakaj kursoj, kiuj ordinare traktas diversajn branĉojn de scienco, lingvistiko kaj esperantologio, kulturo, historio, literaturo, esperantista movado ktp. estas plejofte dumaranĝaj kursoj, kiuj postulas de lernantoj ne nur altajn lingvajn kompetentojn sed ankaŭ fakajn kaj interkulturajn konojn. Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvino) dum RET-07 (18 – 25. 08. 2007) en Primorsko-Aĥtarsko gvidis fakan kurson, kiun li mem nomis tradukista metiejo kaj kiu estis populara inter partoprenintoj de la somera tendaro.

**3. Kriterio – celgrupo laŭ la aĝoj:**
**- porinfanaj (antaŭlernejaj) kursoj;**
**- kursoj por lernejanoj;**
**- kursoj por studentoj;**
**- kursoj por plenkreskuloj.**
Baldur Ragnarsson en la eseo "Studado de aliaj lingvoj" aparte atentigas pri la aĝo de lernantoj kiel pri unu el la esencaj faktoroj en la instruado de Esperanto. "La aĝo draste decidas pri la kvalito de la lernanto. Juna infano spontanee entuziasmiĝas pri lernado, sed ankaŭ rapde laciĝas kaj mallonge plutenas atenton. Matura homo konscias pri la kialo kaj metodo de la lernado kaj povas dumlonge koncentri sian atenton. Adoleskanto lernas kun entuziasmo, se li estas motivita, kaj ankaŭ komencis direkti siajn klopodojn laŭ futura celo. Ĉi tiuj estas nur kelkaj el la kvalitoj, kiujn determinas la tri ĉefaj etapoj de lernado, pli-malpli korespondaj al la infano, adoleskanto kaj matura homo." [5, paĝo 13]
Spertoj pri la enkursa instruado de Esperanto al infanoj de la antaŭlerneja aĝo mankas, ĉar ĝenerale la perado de fremdaj lingvoj en rusiaj infanĝardenoj estas nova, nedeviga kaj dume neprioritata tendenco en la infanedukado.
Kursoj por lernejanoj kaj studentoj povas funkcii kiel oficialaj fakultativaj libervole elekteblaj kursoj en diversgradaj lernejoj kaj universitatoj. Vidu kondiĉojn en la ĉapitro 1. Sed pli ofte kursoj de tiu tipo estas gvidataj kiel movadaj kursoj en la formo de kluboj aŭ rondetoj pri lernado de Esperanto.
Plenkreskuloj venas al kursoj, kiam la gepatra lingvo servas al ili jam kiel plene adoptita baza interkomunikilo, ordinare ili posedas necesajn vivspertojn kaj lernas Esperanton ofte kiel duan aŭ trian fremdan lingvon. Sed samtempe maturaj homoj en la kursoj alfrontas kelkajn gravajn problemojn. Ekzemple, Ili bezonas pli multan tempon kaj pli multajn fortostreĉojn por alproprigo de studmaterialo ol gejunuloj. [6, paĝo 9] La kursoj por plenkreskuloj estas preskaŭ ĉiam movadaj, kaj sekve ili altiras malsamsaĝajn lernantojn, kio neeviteble kaŭzas konkurencon inter la pli junaj mensviglaj kaj fleksiĝemaj gejunuloj kaj pli rigidaj maturaja aŭ eĉ aĝaj homoj.
La instrupraktiko montras, ke pli efikas kursoj, vizitataj de samaĝaj lernantoj, ĉar tiuj havas pli-malpli egalajn interesojn, estas samgrade motivitaj kaj posedas similajn vivspertojn.

**4. Kriterio - baza metodo.**
Instrumetodo (en la malnovgreka lingvo: μέθοδος — vojo) estas interaga procezo inter instruisto kaj lernanto direktita al atingo kaj realigo de konkreta instrucelo. La ĝeneralaj didaktikaj metodoj dividiĝas en tri partojn: en pedagogajn metodojn (instruagoj de instruistoj), lernejanajn metodojn (lernometodoj de lernantoj) kaj

instrumetodojn. Birke Dockhorn nomas la instrumetodojn “grandaj metodokonceptoj” diference de metodelementoj. [7, paĝo.26] Istvan Szerdahelyi konsideras metodon kiel “sisteman kombinadon de rimedoj kaj procedoj por atingi difinitan celon” kaj opinias, ke “absoluta metodo ne ekzistas. Ekzistas nur pli aŭ malpli ĝeneralaj validaj principoj, rimedoj kaj procedoj” [8, paĝo 280] Ĉiuj instrumetodoj posedas objektivan kaj subjektivan enhavojn. La objektiva enhavo de metodo prezentas ĝian esencon kaj bazajn konceptojn, dum la subjektiva flanko montras la majstrecon kaj kreajn alirojn de instruistoj enkadre de konkreta metodo.
La metodiko de Esperanto-instruado listigas nun multajn specifajn kaj originalajn metodojn, sed laŭ la statistikoj de la paĝaro por instruistoj, kursgvidantoj kaj memlernantoj Edukado.net pli popularaj kaj pli ofte aplikataj en la movadaj kursoj estas miksita, gramatika-traduka, aŭdvida, situaci-komunika, rekta, sugestopedia metodoj kaj Cseh-metodo. [9] Klasifiko laŭ la aplikata metodo estas unu el la ĉefaj kaj esencaj karakterizoj de Esperanto-kursoj.
**Miksita metodo** integras elementojn el diversaj metodoj por atingo de difinitaj instruceloj.
**Aŭdvida metodo** apartenas al speco de novaj rektaj metodoj, evoluigantaj unuavice buŝan paroladon.
**Gramatika-traduka metodo** estas tradicia instrua metodo kun tradukado kaj analizado de gramatikaj elementoj kiel bazaj ekzercadformoj.
**Situaci-komunika metodo** simulas realajn komunikajn situaciojn ne sen konvenaj gramatikaĵoj kaj celas paroligon de lernantoj simile al la aŭdvida metodo.
**Rekta metodo** postulas en la instruprocezo uzadon nur de cellingvo, forigon de la gepatra lingvo, ekskludon de gramatikaj ekzercoj kaj lernolibroj.
**Cseh-metodo** estas rekta aŭtora metodo de la Esperanto-instruado de Andreo Cseh sen uzado de lernolibroj sed kun intensa instruado de la gramatiko en la cellingvo.
**Sugestopedia metodo** estas intensa instruado per aktivigo de memorkapabloj, pozitivigo de emocioj, plialtigo de lernomotivado, unuigo de konsciaj kaj senkonsciaj perceptaĵoj, ĝojigo kaj plezurigo de lernantoj en ilia interkomunikado.

**5. Kriterio - individua instruista sperto: aŭtoraj kursoj.**

Ĉiu instruisto dum sia profesia kariero akumulas interesajn spertojn, metodikajn procederojn, utilajn instruteknikojn kaj penas apliki ilin en konkreta praktika laboro. Tiujn individuajn spertojn, kiuj transformiĝas en logikan kaj praktike elprovitan sistemon de metodikaj konceptoj kaj reguloj fare de aparta instruisto kaj ofte apenaŭ ripeteblaj aŭ imiteblaj de aliaj kolegoj, oni nomas aŭtoraj kursoj. La plej fama kaj jam klasika aŭtora kurso de la Esperanto-instruado apartenas al Andreo Cseh (1895 – 1979), kiu en la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento ellaboris propran unikan kombinaĵon de la gramatika kaj rekta metodoj.
En Rusio nuntempe estas bone konata aŭtoro kurso de Irina Gonĉarova “FaRo” (“Faru la Rondon!”), kiun ŝi post multaj serĉoj kaj provoj ellaboris en 2002 por rapida rekta instruado de Esperanto. [10] La baza kurso “FaRo” celas paroligon de lernantoj en la daŭro de deko da duhoraj lecionoj kun varia uzado de plej bonaj adaptaĵoj el rekta, aŭdvida, sugestopedia metodoj [11, paĝo 95] kaj kun abunda aplikado de diversaj instruhelpiloj: bildoj, plakatoj, afiŝoj, objektoj, videoj ktp. Novembre de 2017 finiĝis la 49a kurso “Faru la Rondon!”, kiu entute dum 15 jaroj

da funkciado nombras kelkajn centojn da kursfinintoj kaj estas konsiderata kiel unu el la plej stabilaj kaj sukcesaj aktualaj kursoj de Esperanto.

**6. Kriterio – kursodaŭro:**
- **ekspresa kurso**, ĝis 10 duhoraj lecionoj;
- **mezdaŭra kurso** kun ne pli ol 10 – 15 du-trihoraj lecionoj;
- **longdaŭra** kurso kun pli ol 15 du-trihoraj lecionoj.

Ordinare la daŭro de kursoj dependas de tre multaj faktoroj, kiujn devas atenti kaj konsideri instruistoj, organizante la instruadon: celoj de konkreta kurso, celgrupo, bone atingebla (komforta aŭ ne tre komforta) kursejo, kursonivelo, tipo de kurso, aplikataj instrumetodoj – kaj helpiloj ktp.

**7. Kriterio – organiza formo de kursoj:**
- **ĉeestaj kursoj (engrupaj aŭ individuaj);**
- **distancaj kursoj (korespondaj, retaj).**

Multaj homoj, por lerni Esperanton memstare kaj sendepende de iuj nekonvenaj aŭ malkomfortaj organizaj kondiĉoj (ekzemple: kursejo malproksimas, leciontago – kaj tempo ne taŭgas, oni ŝatas lerni malrapide, konkreta metodo ne estas akceptebla ktp.), uzas diversajn korespondajn retajn (pagatajn aŭ senpagajn) kursojn. La retajn kursojn kaj variajn studeblojn por memlernado povas oferti kiel sukcese kaj mondskale funkciantaj retejoj, kiaj ekzemple estas "Lernu.net", "Edukado.net", "Duolingo.com", tiel ankaŭ societoj aŭ instruistoj pretaj instrui Esperanton al apartaj personoj aŭ grupoj kaj konsultigi lernantojn, uzante por kontaktoj kaj interkomunikado modernajn teknikajn rimedojn, interretajn servojn kaj tujmesaĝilojn. Nikolaj Solomencev (Kostromao) ekde 2010 instruas Esperanton, uzante voĉkomunikilojn. Aŭguste de 2017 li establis retportalon "Esperanto-lando" https://yadi.sk/d/5RB-tG7G3QiTFQ [12], destinitan por reta instruado de Esperanto al blindaj kaj malbone vidantaj homoj. Li kaj liaj tri gekolegoj senpage instruas nun Esperanton rete per voĉkomunikiloj entute al 25 personoj en kvar A kaj-B-nivelaj grupoj.

Ankaŭ ĉeestaj movadaj kursoj iufoje efektiviĝas en la formo de individua studado, se estas koncerna interkonsento inter lernanto kaj instruisto de Esperanto pri ĝia preferata formo. Individuaj kursoj havas multajn avantaĝojn (pli intensaj instruado kaj lernado, laŭplaĉa dozado de instrumaterialo, ampleksa konsidero de individuaj trajtoj de lernanto ktp.) krom ke ili ne disponigas parolkontaktojn kun aliaj personoj, kaj lernanto estas senigita je interaga poliloga konversacia praktiko kaj ne spertas aliajn parolekzemplojn.

Sed en la plimulto da okazaj movadaj ĉeestaj kursoj antaŭvidas instruadon en grupoj, en kiuj kreiĝas amika etoso kaj kiuj ebligas tutgrupan, etgrupan, partneran kaj individuan aktivadojn de kursanoj. Estas grave, ke instruistoj kaj gvidantoj de ĉeestaj kursoj klopodas ĉiurimede stimuli la aktivecon de lernantoj, krei parolsituaciojn, kiuj simulas realajn interparoladojn. Ne malgravas ankaŭ, ke lernantoj en grupoj povas konkurenci inter si, kaj ĉi tiu fakto nur pozitive pledas por ilia plia motivado kaj pli efika ekkomunikiĝo en Esperanto.

**8. Kriterio - proprieta formo de kursoj:**
- **societaj kursoj;**
- **dumaranĝaj kursoj;**
- **privataj kursoj.**

Multaj esperantistaj kluboj, societoj kaj rondetoj konsideras la instruadon de Esperanto unu el siaj gravaj kaj prioritataj edukaj agaddirektoj por popularigo de la internacia lingvo, rekrutigado de novaj membroj, lingva kapabligo de komencantaj esperantistoj. Ordinare la societaj kursoj estas movadtipaj kursoj, sed ĉar ilia gvidado respektive taksado de lingvokonoj de kursanoj kaj atestado nemalofte havas seriozajn organizajn formojn kaj nivelon, ili iĝas gravaj instrumentoj kaj scenejoj por aktiva enkomunumigo de novaj esperantistoj. Ne ĉiam societaj kursoj estas senpagaj.
Sed diference de privataj kursoj, kiuj kutime estas organizataj profitcele kaj havas similajn karakterizaĵojn, ili ĉiam celas vastan informan kaj publikan varban kampanjon.
Dum grandaj instruaj, movadaj aŭ kulturcelaj longdaŭraj aranĝoj ofte estas organizataj porokazaj diversnivelaj kaj diverstemaj kursoj, ordinare aŭspiciataj de organizaj grupoj de koncernaj eventoj. Tradicie tiaj kursoj iĝas partoj de la programo de someraj tendaroj aŭ studadoj kaj tiel ebligas pli amasan partoprenon de komencantoj aŭ malbone parolantaj esperantistoj. La dumaranĝaj kursoj ne ĉiam finiĝas per taksado de lingvokonoj de lernantoj kaj per oficiala enmanigo de atestoj, sed ili povas efike suplementi la oficialan programon. Dum Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-2017) en Poseĥonjo la lingvo estis instruata en la baznivla grupo sub la gvidado de MikaeloĈertilov (Balaŝiĥo) kaj en la paroliga grupo, gvidata de Irina Gonĉarova (Odincovo). La baza kurso por 6 lernantoj konsistis el kvin duhoraj lecionoj. La kvin unuhorajn lecionojn de la Konversacia rondo (KoRo) regule vizitadis 5 – 10 personoj. Ambaŭ kursoj integriĝis al la klerig-eduka programo de RET kaj estis alte aprezitaj de ĉiuj lernantoj.

**Konkludoj**

1. Tipo de kurso dependas de konkreta celo kaj kriterio – tiu distingilo, kiu en plej alcela maniero malkovras ĝiajn esencajn specifajn trajtojn.
2. Por precize karakterizi aŭ difini apartan kurson, ne sufiĉas nur nomi ĝian tipon laŭ la plej konforma esenca, aŭ kiel ofte tio okazas, laŭ ia plaĉa okulfrapa distingilo, ĉar fakte ĝi konglomeras plurajn diversajn tipojn respektive ideojn kaj kriteriojn, kaj tio rezultigas ofte ne koncizan sed pli detalan klasifikadon kaj titoladon de kursoj, ekzemple: baza ĉeesta societa movada rektmetoda kurso por gejunuloj aŭ dumaranĝa daŭriga (B-nivela) kurso por plenkreskuloj ktp. Se afiŝo informas pri kulturcenta kurso, ĝi supozigas unue nur ĝian okazigon ĉe kulturcentro t.e. ĝian lokalizon sed kaŝas aliajn pli gravajn necesajn detalojn kaj informojn.

La prezentita klasifiko de de plej gravaj kursotipoj povas esti uzata de organizantoj kaj gvidantoj de Esperanto-kursoj. La aŭtoro volonte akceptas komentojn kaj sugestojn.

**Referenca literaturo**

1. Paĝo 133
ESPERANTO: lingvo, movado, instruado; redaktinto Detlev Blanke. – Berlin: Zentraler Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR, 1977. – 189 paĝoj
2. Словарь бизнес-терминов. Академик.ру. 2001. /https://dic.academic.ru/
3. Всё об эсперанто. Международный образовательный проект.http://esperanto.su/.
4. Paĝoj 14 - 15

La Komuna Eŭropa Referenckadro. – Universala Esperanto-Asocio. – Rotterdam, 2007. –
24 paĝoj
5. Paĝo 13
Metodiko en la praktiko; redaktinto Zsuzsa Barcsay. – Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. – 128 paĝoj
6. Paĝo 9
Гальскова Н.Д. Современная методика обучения иностранным языкам. Пособие для учителя. – М.: АРКТИ, 2000. – 166с.
7. Paĝo 26
"Manlibro pri instruado de Esperanto": Projekto "Flugiloj demalfacila vento"; redak toro Katalin Kováts. – dua eldono. – Hago,Nederlando: Esperanto@Interreto / ILEI, 2005. - 152 paĝoj
8. Paĝo 280
Gvidlibro por supera ekzameno: historio, literaturo, metodologio; redaktoro Alfonso Pechan. – Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. – 370 paĝoj
9. Statistiko. Informoj pri movadaj kursoj. <Edukado net> http://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=movadajkursoj
10. Sinprezento de Irina Gonĉarova al la Panteono de eminentaj instruistoj ĉe Edukado.net http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=156&s=17bc3dc6f9bf3d60b1c13421a6be3fb2
11. Paĝo 95
Гудсков Н. Л. Epitomo de esperantologio / Конспект по эсперантологии. На языке эсперанто. 2-е издание исправленное и дополненное - Москва: РОСЭ / «ИМПЭТО», 2002. – 152 paĝoj
12. "Esperanto-lando", https://yadi.sk/d/5RB-tG7G3QiTFQhttps://www.youtube.com/watch?v=fZI9DPtB9Y4

## *Anonco:*

## *Literatura konkurso*

Saluton,

Mi sendas al vi tekston pri poezia konkurso, kiu okazas en Francio jam de 20 jaroj, kaj kiun ni sukcesis malfermi al la esperantistaro. Estus grave, ke partoprenus multaj junuloj el diversaj landoj por montri kiel viva kaj diversa estas nia movado. La premio, veni senpage al Parizo dum tri tagoj, estas alloga, kaj renkonti aliajn junulojn de la tuta mondo estas ĉiam neforgesebla sperto.

Tiu jare estis eĉ sendo ĉe la algeria televido pri la fina ceremonio.

Estus do bonege diskonigi tiun konkurson.

***Gilles Tabard,***
***Komitatano de Esperanto-France kaj vic-prezidanto de "Poésie en liberté" (Poezio tut'libera).***

## INTERNACIA KONKURSO DE POEZIO POR JUNULOJ

## POÉSIE EN LIBERTÉ - POEZIO TUT'LIBERA

Tiu konkurso, publikigita en la Oficiala Bulteno de la franca Ministerio pri Edukado, estas organizata de la Asocio «Poésie en liberté» (poezio tut'libera) ekde 1998.

Ĝis nun, la poemoj estis nur franclingve. En 2017, partoprenis 4000 junuloj el pli ol 20 landoj.

En 2018, por la 20-a eldono, dank' al la ago de Esperanto-France, **eblos ankaŭ verki poemojn esperante.**

Kiu povas partopreni? Ĉiuj junuloj aĝaj de 15 ĝis 25 jaroj, el ĉiuj landoj.

La partopreno konsistas en sendo de neeldonita poemo, versa aŭ proza, kun maksimume 30 versoj aŭ 30 linioj. La kandidatoj rajtas sendi po unu poemon en la franca aŭ en la esperanta, sed eblas sendi po unu en ĉiuj el tiuj lingvoj.

La partopreno okazas **nur rete** ekde **la 1-a de januaro ĝis la 7-a de aprilo 2018** uzante la formularon publikigitan ĉe www.poesie-en-liberte.fr

La ĵurio elektos la gajnantojn fine de majo.

En novembro 2018, **tiuj estos invititaj dum 3 tagoj viziti Parizon.** La esperantistoj loĝos ĉe esperantaj familioj, kaj partoprenos grandan finan ceremonion. Samtempe, la poemoj estos eldonitaj en libro.

Do ne hezitu sendi vian poemon. Eĉ se vi ne gajnas premion, via partopreno estas grava. Ni respondos al ĉiuj.

Kontaktoj aŭ demandoj : gilles.tabard@gmail.com www.poesie-en-liberte.fr

---

***CERBE kaj KORE***
***n-ro 1 (69), januaro 2018***
***Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 94***
**BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "RUSIA ESPERANTISTA UNIO"**

***Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta indiko de la fonto***

**CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru .**

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

Redaktofino 28.01.2018